



# PENSEO

*N-ro 177*

*julio./2006*

**Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 17-a jaro <http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm>

## Pardondonado

**Yi Muzi**

Ricevinte la telegramon el la hejmo, kiu legiĝis “patro liberigita rapidu reveni”, li tre nevolonte petis forpermeson.

Multajn jarojn la patrino sole subtenis lian malriĉe disiĝantan hejmon. Lia unuavido falis sur siajn geparojn starantajn ĉe la pordo, kiuj mienis ĝojplene. Alproksimiĝante, li klare vidis la vizaĝon de la patro, palan, malgrasan kaj maljuniĝantan pro longa restado en mallumo de prizono. La patro etendis manon al li, sed li redonis abomenindan rigardon kaj retiris sian manon kvazaŭ elektrofrapite. Li rimarkis la malĝojajn okulojn de la patrino.

Post vespermanĝo, malheliĝis kaj momenton poste la luno ekaperis. La aŭtuna ĉielo aspektis tre klara. Lunlumo disŝutiĝis malsupren senrezerve. Sidante sur la draŝejo antaŭ la domo, li sentis iom da frideco, precipe sur la postkranio ĵus razita. Li ĝin palpis permane. La patro metis surtuton sur liajn ŝultrojn kaj sidiĝis sur la benkon, ne malproksime de li. La tutan tempon li ne ĵetis ekrigardon al sia patro. Senmove sidante, li fikse rigardis la indige nigran monton antaŭan. La patro suĉadis tabakpipon, rigardante sammaniere. La patrino, sin apogante al pordokadro, rigardis senparole dum momento kaj retiriĝis.

La luno kliniĝis pli okcidenten kaj malvarmo pliiĝis. Kvankam portante surtuton sur la ŝultroj, li nevole ekstremis pro nokta

frosto. Li stariĝis kaj eniris la domon. Vidinte tion, la patro ankaŭ lin sekvis.

Nur du tagojn li restis en la hejmo, interparolante kun neniuj. La trian tagon, post matenmanĝo, li, sidinte momenton, pririgardis sian patrinon kaj foriris, kun tiu surtuto sur siaj ŝultroj.

Kiam la lerneja libertempo venis, li skribis leteron al la hejmo, dirante, ke li ne reiros al la hejmo por Printempa Festo kaj perlaboros en la butikon proksima al la lernejo.

Du jaroj forpasis kaj li ne hejmeniris eĉ unu fojon. Li prunteprenis monon por pagi sian kotizon kaj perlaboris iom da mono sin vivteni.

Nelonge post komenco de la unua semestro de la kvara jaro en universitato, li ricevis telegramon el la hejmo, legiĝantan “Patrino serioze malsana rapidu reveni”.

Kiam li atingis la hejmon, li trovis, ke la patrino kuŝas en la lito, kun buŝo jen malfermetanta jen fermetanta. Li alproksimiĝis al ŝia lito kaj surgenuiĝis. Malferminte siajn okulojn, ŝi palpis lian kapon per sia kruda mano. Ŝiaj malklaraj larmoj glitis malsupren al la kapkuseno. Post longa momento, ŝi diris, “Vi donu pardonon al li...”

La aŭtuna vento sible disblovis flavajn foliojn sur la tuta monto. Post enterigo de la patrino, li estis preta reveni al la lernejo. Irinte nemalproksime de sia hejmo, li turnis sian kapon kaj trovis sian patron sidanta ĉe la sojlo kun la kapo ĉirkaŭprenanta per ambaŭ manoj.

Tre baldaŭ li diplomiĝis kaj oficiĝis. La ritmo de la vivo forgesigis lin pri la pasinteco. Unu monaton antaŭ la Printempa Festo, li kaj

lia amikino geedziĝis en la preĝejo de la gubernia urbo.

Ĝuste antaŭvespere de la Printempa Festo, la patro ricevis lian leteron, en kiu li diris, “Mi jam edziĝis.”

La patro sensone iris al la draŝejo. Kaŭrante tie silente, li klinis sian kapon malsupren antaŭ sia brusto. Ĉirkaŭe aŭdiĝis eksplodoj de petardoj...

Ĉiumonate li poŝtendis monon al la hejmo, sed neniu fojon li hejmeniris.

.....

En la aŭtuna vento rapidanta tra la stratoj de la urbo, li hasteme reiris hejmen.

“Kio okazas?” li demandis al sia edzino.

“La telegramo de via najbaro diras, ke via patro estas mortonta kaj ke vi reiru hejmen rapide.”

Post kelkaj jaroj, la domo aspektis des pli kaduke. La patro kuŝis en la lito, nepovante paroli. Alproksimiĝinte, li montris sian edzinon apud si. La patro movetis sian buŝangulon kaj fikse rigardis lin...

Post nelonge, la patro forpasis. Li enterigis lin sur la monto, tuj apud la tombo de la patrino. Tiam la aŭtuna vento urĝis kaj flavaj folioj kirliĝis sur la montoj.

Ordigante la postlasaĵojn de la patro, li trovis, ke la patro ne elspezis eĉ unu groŝon de la mono de li sendita. Tiko fulmis sur lia vizaĝo.

Reveninte al la urbo, li ree suriris la normalan trakon de sia vivo.

Post nelonge li ekhavis infanon, kio des pli lin kontentigis kaj ĝojigis.

.....

Palpebrume tridek jaroj forpasis. La postiĝinta montvilaĝo ŝanĝiĝis preskaŭ neniom. Antaŭ la disfalinta domo, maljunulo staris tie longan tempon.

Vesperkrepusko alproksimiĝis kaj malheliĝis iom post iom. Sur la montsupro, antaŭ la tombo droninta en sovaĝaj herboj, la maljunulo staris kun malnova surtuto sur siaj

ŝultroj. La vento malorde blovis liajn blankajn harojn.

“Paĉjo, pardonu min,” li plorsingultis, kun larmoj fluantaj sur la maljuna vizaĝo.

La aŭtuna vento, sible trakurante la monton, blovfaligis la flavajn foliojn restantajn sur la branĉojn.



elĉinigris **Elerno**

## Wang Wei (701-761)

### Ĉe adiaŭo al amiko

Kien vi iros? Mi dediĉas vinon  
ĉe disiĝ' descendinte de ĉevalo.  
Respondis vi, ke pro la elreviĝo  
vi ermitiĝos al suda montvalo.  
Adiaŭ! Ho, mi ne demandu plue!  
Senfine blankos nur la nub-vualo.

Trad. **Guozhu**

## Bai Juyi(772-846)

### Laŭ Malnova Vojo

De urbo dudek liojn okcidente,  
balancas mil salikaj vergoj vente.

Post dek kvin jaroj, laŭ malnova vojo,  
reven' al ponto ĉe printempa roĝo.

Post la disiĝ' de mi kaj kara mia,  
Ve! de ŝi venis informo nenia!

Trad. **Guozhu**

## El Libro de Poezio

# Steletoj

*\*malalt-ranga oficisto oficveturas dum nokto, plendante pri sia sorto.*

Etaj steloj helscintilas  
 Tri aŭ kvin en oriento.  
 Haste mi dum nokto iras  
 Por regn-servo laŭ regento.  
 Ho, ne samas la fataloj!  
 Etaj steloj flagre brilas  
 Ĉe Altajro kaj Plejado.  
 Haste mi nokte paŝiras  
 Kun littuko sen rajdado.  
 Diferencas, ho, fataloj!

## Rivero kun branĉrojo

*\*edzino forlasita de la edzo plendas kun deziro de la edza pento.*

Ondas river' kun branĉrojo.  
 Nun vi kun alia ino  
 Min forlasas, en malĝojo  
 Mi doloras. Eble al mi  
 Pintos vi kun korinklino.  
 Ondas ĉe sablej' rivero.  
 Nun vi kun alia ino  
 Min forlasas, en sufero  
 Mi baraktas. Eble ree  
 Venos vi al mia sino.  
 Ondas rivero susure.  
 Nun vi kun alia ino  
 Min forlasas. Mi murmure  
 Ploras, kantante ĉagrene,  
 Pro kore trista esprimo.

## Kampe antipolo falas

*\*juna ĉasisto trafas predojn, renkontante junulinon, kaj ankaŭ ganjas ŝian amon.*

Kampe falas antipolo  
 Sur blankherboj sen rezisto.  
 Junulinon kun am-volo  
 Amindumas la ĉasisto.  
 Lerte hakas ŝi arbedojn,  
 Cerv' de li trafata falas.  
 Li per herboj ligas predojn,  
 Kaj ŝi jaspobrile klaras.  
 "Lante, lante!" diras kvere  
 Ŝi, "Leĝere, vi, leĝere!  
 Via fuŝpalpo ne glitu!  
 Jelpi hundon ne incitu!"

## Kiel pompe bunta

*\*kanto por nupto de nobela familio. (iuj komentis, ke la poemo temas pri la nupto de filino de Princo Qi kaj nepo de Reĝo Ping de Zhou-dinastio en 683 a. K.)*

Kiel estas pompe bunta  
 La floranta prunarbaro,  
 Tiel estas luksabunda  
 La princina nupta ĉaro.  
 Same kiel pompe buntas  
 Persikarbo la floranta.  
 Nep' de reĝo luksabundas  
 Kun princino eleganta.  
 Silka fadeno tordanta  
 Estas por fiŝhoka strebo.  
 La princino eleganta  
 Kaj la nobla reĝa nepo.

Tradukis Sceto

## Ses Sekundoj

Gu Yuke

Sur la ponto staris viro kaj virino.  
 La virino alproksimiĝis al la viro kaj diris,  
 "Lasu min ami vin."

